Strukturo de la oracio 19, 3
Surteraj vivaĵoj ankoraŭ nekonataj 19, 73
Ŝakalo 12, 106
Ŝtupoj sen nomo 12, 73

Tagiĝo de la Europa medicino en Japanujo 11, 134
Teknika Vortaro, Raporto de la Direktoro 18, 115
Teknikaj pseudosufiksoj 15, 23
Tekstkritiko 17, 43
Teorio de ekspansianta universo 15, 29
Terminologia centro: informoj 12, 12 14, 72
Terminologia centro 16, 134
Terminologiaj demandoj en sintakso 18, 41
tetrado 15, 127
Tipografio en rilato kun supersignoj 18, 120
Tradukado automata 13, 55
Tragedio en la universo 12, 129
Transskribo de geografiaj nomoj en E 13, 84
Transdona cirkvito kiu entenas negativan elementon 18, 139
Troviĝo, konsisto kaj genezo de la ardorezistaj argilŝtonoj 16, 101
turga 15, 127

Ukraina sciencisto de XV jarcento Jurij de Drohobyĉ 19, 59
Unuaj dissekcadoj en Japanujo 11, 142
Ungomalsano kauzita de vibroj 19, 113
Utiligo de Conchocelis — kreskanta en ostrokonko por enakvuja nutrado de Pinctada martensii 17, 129

Valoro de Esperanto por internacia evoluo de medicino 13, 119
Veldokonstruaĵoj 14, 42
Vertikalaj sablodrenoj aplikataj dum vojkonstruado sur tofo 16, 69
Vibroizolitaj fundamentoj por maŝinoj kun dinamikaj ŝarĝoj 18, 103
Videotelefona linioj en Urbekistano 14, 123
Virino ĉe la Landlimo 12, 68
Vitralo 12, 75
Vivo de homoj sur aliaj planedoj 15, 87
Vortoj el la Fundamento ekster la universala vortaro 11, 71
Vortoj el la Fundamento de Esperanto 11, 89
Vortspecoj de la subjekta predikativo kaj de la pasiva participo 12, 45
Vortofteco 19, 41

Zamenhof, Creator of Esperanto 12, 132
Zigoto 15, 127



## EL LA FAKOJ

### Sciigoj de la Terminologia Centro de I. S. A. E.

(ISAE—TC—134)

(La fakoj estas envicigitaj laŭ la UDK. Ni uzas la simbolojn por lingvoj denove laŭ la esperantaj nomoj, do: A angla, F franca, G germana, H hispana, I itala ktp.)

30 + 32 + 33 **Sociologio. Politiko. Politika ekonomio.** — Pri terminoj de ĉi tiuj fakoj de la Slipara Vortaro (SV) deziras kunlabori s-ro Dermod J. F. Quirke, bibliotekisto, 101 Allfarthing Lane, London SW 18, Anglujo.

52 **Astronomio.** — D-ro Josip Kleczek ,Astronomical Institute, Czechoslovak Akademy of Sciences, Observatory Ondřejov, Ĉeĥoslovakio, preparas duan eldenon de »Astronomia vortaro en ses lingvoj« eldonota de Academic Press, New York — London, publ. De la Scienca Akademio de Ĉeĥoslovakio. S-ro André Heck, 36, rue Haut-Vinâve, Jalhay, Belgio, deziras kunlabori pri tiu terminaro.

531.7 + 537.7 **Mekanikaj kaj elektraj mezur-unuoj.** — Kiel antaŭlaboron al sia projekto, verki esperantlingvan kompendion de Elektro respektive Elektrotekniko, inĝ. K. J. Young, Broadmoor Hospital, Crowthorne, Berks., RGII—7EG, Anglujo, prilaboras la Esperanto-terminojn de la fizikaj grandoj kaj unuoj de la Internacia mezursistemo »S. I.« (= Système International), en kunlaboro kun s-ro A. Alonso Nuñez, Michelena 16—4°, Pontevedra, Hispanujo.

541.13 : 621.35 **Elektrokemio kaj Galvanizado.** — Post longe aperis la kompendio »La fundamentoj de elektrokemio kaj elektrodeponado«, en la angla verkita de Samuel Glasstone, D. Sc., Ph. D. (1960), esperantigita de John McCarthy; traduko eldonita de »Interparl«, P. O. Box 213, Monroeville, Pennsylvania, 15146, Usono, en kunlaboro kun »Kemio Internacia«, Casilla de Correo 1040, Montevideo, Urugvajo. Tole bindita 104-paĝa teksto + 18-paĝa listo de la teknikaj terminoj rilate al elektrotegado Eo-A kaj A-Eo; 13 x 19 cm Montevideo, 1968. Prezo 3,20 us dol.

62 **Tekniko kaj Inĝenieraĵoj.** — La Teknikista Sekcio de la nove fondiĝinta Ĉeĥa Esperanto-Asocio komisiis inĝ. Aleŝ Bednaŕik, Svätoplukova C/6, SENEC, okr. Bratislava-vidiek, Ĉeĥoslovakio, kiel fakvortaran zorganton.

629.19 **Astronaŭtiko.** — Preparas mallongan terminaron Eo-A-R pri kosmonaŭtiko (ĉ. 400 terminoj) s-ro Ivanov, g. Ĵeleznodorijnij 3, Moskv. obl. ul Juĵnaja d. 4 C. I., Sovetio. Li serĉas personojn pretajn por partopreni tiun laboron.

661 + 54 **Kemia Tekniko.** — Inĝ. Z. Pluharr, kemiisto en la kemia industrio, Jungmannova 438/9, Litomerice, ĈSSR, anoncis sin kiel kunlaboranto en la Fakterminologia Komisiono por Kemio kaj Kemia Tekniko de la »SV«. Li publikigis en »KEMIO internacia« jarkolektoj 1966/67 jenajn traktaĵojn:

1) Sperto pri plene mekanika deponado de naturfosfato.
2) Problemoj ĉirkaŭ la kvalito de natria fluorosilikato.
3) Parte malkomponigita naturfosfato.

661.93 : 66.048 **Kemia Tekniko.** — S-ro inĝ. J. Manceau, 14, rue de la Mine, F-57 Creutzwald (Moselle), Franoujo, tradukis el la franca originalo traktaĵon de inĝ. Bernard Rolet »La modernaj aparatoj por produktado de oksigeno kaj nitrogeno per aerdistilado« Ĉi tiu traduko traduko en »Kemio internacia«, Vol. 3 kaj 4, 1967/68, entute sur 40 paĝoj 15,5 x 21,5 cm.

688 **Tekstil-industrio.** — Volas kunlabori aŭ kontroli en la tekstil-industria terminaro s-ro J. L. Muller, Econ. drs., Burg. s'Jacoblaan 42, Bussum, Nederlando. Li estas ekonomikisto kaj financa kaj ekonomika direktoro de tekstilindustriaj entreprenoj kaj povus helpi en la fakoj oficejo banko, borso, kotonŝpinado, teksado, trikado, produktado de sintezaj teksaĵkrudaĵoj.

R. Haferkorn

## ELDONA AKTIVECO DE ISAE

**Scienca Revuo** estas ĉefa eldonaĵo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Aperas 6 numeroj jare, ekde la 1949-a jaro (nur en la 1961-a la revuo ne aperis), tiel ke por la 1969-a jaro aperis Vol. 20 de la Scienca Revuo. La artikoloj en la revuo estas sciencaj kaj popularsciencaj, el diversaj sciencaj branĉoj, pli ofte originalaj ol tradukitaj. Multaj prelegoj el la Internacia Somera Universitato estas publikigitaj en la revuo, en ĝi ofte troviĝas ankaŭ originalaj esplorartikoloj de eminentaj sciencistoj. Prilingvaj temoj, sciencaj informoj kaj sciigoj de la Terminologia Centro el diversaj fakoj trovas ĉiam sian lokon en la Scienca Revuo.

La jarabono estas 50 steloj, sed por la junaj membroj (pere de STELO-studenata sekcio) nur 30 st. La abonojn kolektas la delegita reto de ISAE. Administrejo kaj redaktejo ĉe Prof. B. Popović, Ognjena Price 80 BEOGRAD, Jugoslavio. (Abono enhavas la kotizon por ISAE).

**Bulteno de ISAE kaj** de ĝiaj sekcioj servas por la plifaciligo de kontaktoj inter la membroj de ISAE kaj ĝia Estraro, same inter diversaj sekcioj de ISAE. Pro tio ĝi aperas laŭbezone, 4—6 numeroj jare (po 4—8 paĝoj). La enhavo estas pure organiza, kun la koncernaj informoj, raportoj, diskutoj ktp. La membroj la sekcio de ISAE (pagantaj al ISAE la minimuman jarkotizon. 10 st.) recevadas la Bultenon senpage.

**Medicina Revuo** estas eldonaĵo de UMEA — medicina sekcio de ISAE Aperas du numeroj jare, tiel ke unu volumo aperas dum du jaroj. Jarabono (po 2 numeroj) estas 15 steloj. En la revuo aperas nur fakaj artikoloj. Adreso: D-ro Masao Suzuki, Fiziologia Instituto, Med. fakultato, Tiba Universitato, TIBA, Japanio.

**Sciencaj Studoj** aperis en unu granda volumo, okaze de la 50-jara jubileo de ISAE. La libro havas 38 sciencajn artikolojn, bazitajn sur orginalaj esploroj kaj observoj, verkitaj de konataj sciencistoj el ĉ. 20 sciencaj branĉoj. La libro montras la efektivan uzeblecon de Esperanto en ĉiuj sciencaj kampoj, pro kio ĉiu scienca biblioteko devus posedi ĝin Krom tio ĝi estas tre malmultekosta: 240 grandformataj paĝoj por nur 50 steloj (30 anglaj ŝilingoj, aŭ la egalvaloro de 3,60 dolaroj).

**Geologio Internacia** aperis la unuan fojon en unu 200-paĝa volumo por jaro 1968, havebla je la prezo de 24 steloj (1,65 us. dol) kun sendokosto kaj membreco al Geologia sekcio.

**Planoj por estonta eldona aktiveco,** dependa de la monrimedoj, enhavas publikigadon de diversaj fakaj libroj, internacie uzataj, instigon al la eldonado de pure fakaj revuaj, pli intima kunlaboro kun la popularscienca serio de STAFETO (aŭ de aliaj eldonontoj) ktp.

**La fondaĵo »Scienco«** estas kreita por finance helpi tian aktivecon, pro kio estas grava devo de ĉiu membro aŭ amiko de ISAE subteni la fondaĵon, ĉu per propraj ĉu per kolektataj kontribuoj (la monon transprenas la delegitoj kaj la sekretariejo de ISAE).